

## Bonvenon al Legnica

7-14-a de aŭgusto 2021

**P**ost longa pripensado kaj diskutado, la estraro de KELI kaj LKK decidis, ke nuntempaj kondiĉoj permesas organizi sekuran kongreson, se ni ĉiuj estos atentemaj, empatiaj kaj zorgos pri aliaj kunpartoprenantoj

Ĝi okazos en la tagoj 7-14-a de aŭgusto 2021 kaj ni esperas, ke plejmulto de plifruaj aliĝintoj povos alveni al Legnica. Se iu ne volas, aŭ ne povas pro diversaj kialoj, ni petas, informu pri tio al la organizantoj.

Ni esperas al vi ĉiuj bonfarton kaj sanon ĝis la fino de tiu pandemio.

Legu pli surrete: <https://keli.sea-vroc.eu/>

La kongresejo estos  
Alta Porpastra Seminario  
en Legnica



## KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia  
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

*Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto:** Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,  
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;  
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

**Sekretario:** Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,  
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio  
☎ +420 723 672 335;  
✉ polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto:** Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,  
HU 1072 Budapest, Hungario  
☎ +36 302 000 306;  
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':

CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;

IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon [www.chez.com/keli/](http://www.chez.com/keli/)

## DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908  
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

**Redaktoro:** Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio  
☎ +46 70 2004574; ✉ dr\_board@yahoo.se

**Kontrollegis:** Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.*

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady,  
Ĉeĥio

✉ info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## Enhavo

Paroladoj en la Agoj de la Apostoloj	52
Tabelvortoj pri la Agoj de la Apostoloj	55
Biologia plureco – propeco kaj unu el la kondiĉoj de la vivo	63
Tagordo por la jarkunveno de KELI 2021	67
Financaj raportoj de KELI	68
Se ĉiujn lingvojn mi regus	72

## Redaktoraĵo vortoj

**K**ara leganto, finfine la estraro povas Kanonci kongreson! Kiel skribite frontpaĝe, la decido ne estis facila, kaj pro tio la nuna numero de Dia Regno ankaŭ iom malfrue pretiĝis.

La tempo prepari ĉion kaj plani la vojaĝojn estas mallonga, sed ni esperas, ke kiom eble plej multaj tamen povas kapti la okazon renkontiĝi kun novaj kaj malnovaj geamikoj en kristana esperanta etoso.

Informojn diversspecajn pri la kongreso, i.a. la aliĝilon se vi ankoraŭ ne aliĝis, vi trovas ĉe: [keli.sea-vroc.eu/](http://keli.sea-vroc.eu/). Vizitu la paĝaron por ĝisdatigi vin pri la kongreso. Ankaŭ se vi ne povos partopreni ni certe publikigos informon kiu estos interesa ankaŭ por nepartoprenantoj, ĉar eblos, se ni trovos teknikiston, ke iujn programerojn estos filmataj kaj dissendataj.

Fine; mi volonte akceptos raportojn aŭ alia materialo de vi por ebla publikigo en estontaj numeroj.

Havu bonan someron!

# Paroladoj en la Agoj de la Apostoloj

Prelego dum virtualaj Bibliaj Tagoj la 26an de februaro 2021

Philippe Cousson, FR

Daŭrigo de antaŭa numero

Komunaj temoj aŭ preskaŭ

Tra tiuj ĉi paroladoj cititaj de Luko en la libro de la Agoj de la Apostoloj oni trovas plurajn komunajn temojn. Ili indikas kio gravas en la kristana predikado.

Mia ordo de citado ne estas statistika. Ne konkludu ion en ĝi.

**Jesuo, Kristo**, la Sinjoro troviĝas, kiel kelkaj aliaj temoj, en ĉiu parolado krom unu. La kristana mesaĝo sen Kristo ne plu estas kristana. Neniam citata unue, la persono, rolo de Jesuo Kristo estas esenca en la mesaĝo de la Apostoloj. Li estas antaŭanoncita de la profetoj kaj patriarkoj, de David. Enkondukita de Johano la Baptisto, li estas la plenumanto de la diroj de la profetoj. Viro de Dio, li estis elmontrita al la homoj per potencaĵoj, mirakloj kaj signoj. Malkonfesa de la homoj, li suferis kaj mortis. De Dio li estis relevita el la morto, en gloro li staras dekstre de Dio. Li estis sendata por beno, ricevinte la promeson de la Spirito. Li estis elektita de Dio, la kreinto, kiel garantio por la justa juĝo de la mondo. Li estis humile servata kaj proklamata de la apostoloj, kiujn li komisiis, kaj atestata antaŭ Judoj kaj Grekoj. Li peris la sanigon de la almozulo. Li haltis Paŭlon en sia persekutado kaj sendis lin por atesti.

Ankaŭ gravas en la mesaĝo de la Apostoloj la proklamo de **la releviĝo de Jesuo**. La Evangelio ne valoras, se oni flankenmetas la releviĝon. Tiu proklamo estis kaj restas miskomprenita de multaj, malsaĝeco aŭ skandalo. Tiun releviĝon de la Kristo, kiu troviĝis jam en la vortoj de David plenumis Dio. La nomo de la releviĝinto kapablas fortigi la lamulon. De lia releviĝo estas multaj atestantoj kaj de ĝi fontas promeso, garantio de savo, de lumo al la popolo kaj al la nacioj.

**μετάνοια**

Alia ne evitenda parto de la Evangelia mesaĝo estas la alvoko al **pento**, kaj nur malmultaj paroladoj ne mencias aŭ aludas ĝin. “Ekpentu kaj baptiĝu”. “Pentu do, kaj konvertiĝu”. Johano predikis la bapton de pento. En Efeso, Paŭlo atestis pri pento antaŭ Dio. “Leviĝu kaj baptiĝu kaj forlavu viajn pekojn” aŭ pli ĝuste “releviĝinta baptiĝu kaj laviĝu de viaj pekoj”. Oni trovas tri grekajn radikojn kun proksima signifo. Ĉefe μετάνοια, ankaŭ επιστρεψις, respektive kun la signifo de returniĝo, renvers-iĝo, kaj ankaŭ ἀναστασις kiu ankaŭ

signifas releviĝo, samtempe stariĝo kaj reviviĝo.

En ĉio, en ĉiuj ĉi tiuj paroladoj, oni proklamas ke **Dio agas**, ke li kondukas ĉion pri la savo. En la citita profeta teksto de Joel, Dio estas la subjekto de ĉiuj agoverboj. Ankaŭ la veno de Jesuo estas agado de Dio, intenco kaj antaŭscio. Sed ĉefe, Dio estas la aganto en la releviĝo de Jesuo el la mortintoj. En la tuta rerakonto de Stefano pri la bibliaj okazaĵoj, Dio aperas kiel la aganto, kiu rilatas kun la patriarkoj kaj la profetoj. Same estas en la parolado de Paŭlo en Antioĥia, sed en iom pli mallonga formo. Li ankaŭ proklamas ke Dio estas la aganto en la releviĝo de Jesuo, kaj estas tiu, kiu plenumis al ni, por ni, la promeson faritan al la patroj, kaj ankaŭ la pardonon de la pekoj kaj la pravigon. Antaŭ la Atenanoj, Paŭlo asertas ke Dio agis, estras en la kreado de la mondo, difinas la epokojn (la bonajn momentojn καιρος), elektis sian Kriston kaj relevis lin el la mortintoj. En la daŭro de la vojo de Paŭlo Dio akompanas lin per la agado de la Sankta Spirito. Antaŭ la akuzanta homamaso, Paŭlo asertas ke lia servo, lia

misio iri al la nacioj estis difinita de Dio mem. Li ankaŭ antaŭ Agripo pledas por agnosko de la kapablo de Dio relevi el la mortintoj kiel estis pruvata pere de la releviĝo de Jesuo. Li ankaŭ atestas pri la helpo ricevita de Dio.

Tamen, niaj paroladoj distingiĝas en la premisoj. Aŭ la proklamanto komencas per aludo al la Sanktaj Skriboj, (Leĝo, profetoj, psalmoj) aŭ per atesto pri persona sperto. Kiam la aŭskultantaro estas ĉefe Judoj aŭ timantoj de Dio, kiuj bone konas tiujn tekstojn kaj iliajn rakontojn, la predikistoj uzas ilin.

**El la Skriboj**, Petro uzis la profeton Joel kaj psalmojn de David. Jesuo estas la sekvo de tiu historio, la sekvo, konsekvenco de la agado de Dio. Nenio nova, nur plenumiĝo, markita de la releviĝo. Antaŭ la homoj ĉe la pordo de la Templo, li komencis de Abraham kaj la patriarkoj, kaj tra la profetoj kaj Moseo kaj Samuel kondukis al Jesuo. Kaj la releviĝo de Kristo estas la signo de beno kaj penton (deturni, αποστρεφειν). Stefano, multe pli detale trairis la bibliajn rakontojn, de Ĥaran al Egiptujo, de Jozef al Moseo, de la tabernaklo al la Templo, de la persekutitaj profetoj al la kruco de Jesuo. Paŭlo, en la sinagogo en Antioĥia komencis en Egiptujo kaj menciis la konkeron de la Kanaana lando, kaj tra Samuel kaj Saulo iris rekte de David al Jesuo, kiu estas la plenumo de la promeso konfirmita de Johano. En la postaj cititaj paroladoj, Paŭlo ne plu aludas la Skribojn, krom antaŭ Agripo (Moseo kaj la profetoj).

Paŭlo uzas ekde Ateno alian premison, sian **propran sperton**. Li ra-



Paŭlo predikas en Ateno. (Raphael, 1515)

kontas pri altaro, kiun li hazarde vidis en la urbo, Tiu altaro estas ja konata ekster la kristana literaturo. Tie, li trovis komunan grundon por prezenti la Evangelion. Duona sukceso. Al la respondeculoj de la komunumo de Efeso, li dividis komunajn rememorojn, kaj ankaŭ siajn proprajn sentojn. Emociiga momento. En la lastaj ĉapitroj, Paŭlo pravigas sian vivon. Li rakontas kiu li estis antaŭ sia renkontiĝo kun Jesuo survoje al Damasko (antaŭ la sinedrio li ne povis iri plu), kaj kiu li estis poste, kiamaniere Dio kondukis lin.

**Atestantoj** estis ĉi tiuj parolintoj. Ili rakontis pri la releviĝo de Jesuo Kristo, kiun ili spertis. Ili rakontas pri sia renkontiĝo kun Jesuo, renkontiĝo pli posta, post Pentekosto. Tion ili asertas, “Pri kio, ni (ĉiuj) estas atestantoj (μαρτυρες)”. Martiro ne estas tiu, kiu mortas, sed tiu, kiu atestas. “Multaj, kiuj venis kun li el Galileo [...] nun estas liaj atestantoj ĉe la popolo”. “Ateston farante al Judoj kaj Grekoj pri pento antaŭ Dio kaj pri fido al nia Sinjoro Jesuo Kristo”. “Se nur mi povos plenumi [...] la komision, kiun mi ricevis de la Sinjoro Jesuo, atesti la evangelion de la graco de Dio.” “Ĉar vi estos lia atestanto antaŭ ĉiuj homoj pri ĉio, kion vi vidis kaj aŭdis.” Jesuo aperis al Paŭlo “por difini vin [Paŭlon] kiel servanton al mi [Jesuo] kaj atestanton pri la cirkonstancoj, en kiuj vi [Paŭlo] jam vidis min [Jesumon], kaj ankaŭ en kiuj mi [Jesuo] poste aperos al vi [Paŭlo]”. Pri la vorto μαρτυς, μαρτυρος, kies signifo estas esence atestanto, kiel mi jam diris, strange nia esperanta traduko denove

interpretis en 22,20, parolante pri Stefano kaj tradukis “martiro”.

Kiam preskaŭ ĉiuj paroladoj mencias la releviĝon, kelkaj ankaŭ mencias la **krucumadon**. Kiam tiuj vortoj estis adresitaj al loĝantoj de Jerusalemo, la apostoloj diris ke ili estis la kaŭzo de tiu mortigo. “Lin, laŭ la difinita intenco kaj antaŭscio de Dio transdonitan, vi per la manoj de senleĝuloj krucumis kaj mortigis.”<sup>2,23</sup> La intenco estas de Dio, la efektiviĝo de la popolo (vi) kaj la realigo de la Romianoj (la senleĝuloj). En la posta ĉapitro: vi transdonis malkonfesis kaj mortigis la servanton de Dio, nome Jesuo. Stefano same akuzas: “la Justulo, de kiu vi nun fariĝis la perfidintoj kaj mortigintoj”. En Antioĥia, Paŭlo same riproĉas la krucumadon al la Jerusalemano. “Ĉar la loĝantoj en Jerusalemo kaj iliaj regantoj ne konis lin; kaj kondamnante lin, ili plenumis la voĉojn de la profetoj ĉiusabate legatajn. Kaj trovinte en li nenian kaŭzon de morto, ili tamen petis Pilaton mortigi lin.” Ni notu ke tiu mortigo “plenumas la voĉojn de la profetoj.” Estas multaj diskutoj pri la funkcio de tiu elverŝado de la sango de Jesuo. Ĝi aperas necesa, antaŭanoncita, plenumanta. Al la pliaĝuloj kaj respondeculoj de Efeso, Paŭlo donas elementon: Dio aĉetis la Eklezion per sia propra sango. Restas tamen laboro por la teologoj: Kial estis necesa tiu kruela morto? Se estis aĉeto, al kiu Dio aĉetis? Ĉu ĝi estas la prezo por la pekaj de la homoj? Simplaj respondoj ne sufiĉas. Ĉu eĉ ili utilas?

Alia lasta elemento, kiu troviĝas en preskaŭ ĉiuj ĉi paroladoj: **la promeso, la**

**espero.** Releviĝinta, Jesuo elverŝis la Sanktan Spiriton laŭ la promeso farita. Venos “tempoj (καιρος) de refreŝiĝo de la vizaĝo de la Sinjoro [tradukita la Eternulo]”, “tempoj (χρονος) de restarigo de ĉio”. Stefano rediras la promesojn de Dio al Abraham. Laŭ la promeso, el la idaro de David, Dio venigis al Izrael Savanton, Jesuon, kaj tiel plenumante ĝin, Dio relevis lin. Paŭlo esprimas la esperon tiel: “li [Jesuo] unua per la revivigado de mortintoj proklamos lumon al la popolo kaj al la naciojn”.

Mi povus ankaŭ paroli pri aliaj temoj, kiuj kuras en tiuj tekstoj: ekzemple la fido, la pardono de la pekoj,

## Konkludo

Mi nun volas konkludi per rimarkoj, kiuj tuŝas nian nunan homiletikon, tio estas la manieron proklami, prediki la Evangelion, rigardante tiujn paroladojn.

### *La persono de Jesuo Kristo ne estas apendico de nia vivo, — ĝi estas la koro, la kerno de nia vivo.*

Kelkaj aspektoj estas kaj restas nepraj. Ni estas atestantoj, atestantoj pri nia renkontiĝo persona kun la releviĝinto. Kristanismo ne estas unu filozofio inter aliaj. Ĝi estas persona rilato kun Dio. Tiu renkonto povas okazi en tre diversaj manieroj, post persona vivsperto, bona aŭ malbona, post filozofia konvinkiĝo, post renkonto kun atestanto

de Kristo, post persona legado aŭ aŭdado de la Biblio aŭ de alia libro, sed finfine establiĝas tiu rekta rilato.

Kristanismo sen Kristo ne plu estas kristanismo. Nia vivo estas en Kristo. Nia atesto, nia parola kaj aga atesto estas *en* Kristo, *pri* Kristo, *pro* Kristo. La persono de Jesuo Kristo ne estas apendico de nia vivo, ĝi estas la koro, la kerno de nia vivo. El li fontas nia espero.

Kristo releviĝis. Li estis mortigita kaj Dio relevis lin. Tio ne estas flanka aspekto de la fido. Se Kristo ne releviĝis, nia fido estas vana. Ĉu al aliaj la releviĝo estas skandalo, ĉu estas frenezeco, ĝi al ni estas firma grundo. Pri ĝi ni aŭdacu paroli, pripensi, mediti.

Prediki la penton, la konvertiĝon, la returniĝon, la renversiĝon, tio estas same nepra. Tio apartenas al la kristana proklamo. Sen modifi la celon de la vivo, sen ŝanĝiĝi, ne estas eble iri la vojon de la Evangelio. Kaj tiu ŝanĝiĝo estas la konsekvenco de la renkontiĝo kun Kristo. La iniciato estas de ambaŭ, Dio serĉas ĉiun el ni kaj donas al ni la forton, la konvinkon turni nin al li, kaj ni tion faras. Ni povas turni nin al li ĝuste ĉar li venas al ni. En tio, ni agnoskas ke Dio regas. Li agis kaj agas en la historio de la universo, en la historio de la homoj, en la historio de lia popolo Izrael, en la historio de la Eklezio, eĉ se tiuj foje (ofte) devojiĝas. Ni ne rigardu al ni, eraremaj, sed ni rigardu al li, fidinda.

Oni trovas en la Skriboj la arkivojn de tiu regado de Dio, de la erarvagemo de la homoj kaj de la plano kaj promeso de la savo de Dio per Jesuo Kristo. En ili estas nutraĵo por ni. Estas fonto de savo

por ĉiu homo kiu esperas kaj serĉas. El ili oni povas proklami la Evangelion, la bonan novaĵon.

Du gravaj aspektoj estas postulataj de niaj kunuloj, de niaj spektantoj, de niaj aŭskultantoj, la aŭtoritato kaj la aŭtentikeco. Tiujn oni povas trovi en tiuj paroladoj. Tiuj kiuj estas konstruitaj, komencaj per la Skriboj baziĝas sur aŭtoritato, aŭtoritato akceptata de la aŭskultantaro. Tiuj kiuj estas konstruitaj sur la persona sperto baziĝas sur la aŭtentikeco de la

atestanto. Fakte ambaŭ samtempe. Komunan grundon oni devas trovi, ĉu per aŭtoritato komuna, ĉu per aŭtentikeco agnoskita, por povi atesti pri Kristo, cetere ankaŭ pri io ajn.

Tiuj ĉi paroladoj estas leg-endaj tekstoj, studendaj, meditendaj por bone pensi nian propran vivon, nian propran fidon kaj nian propran ateston al Kristo kaj al lia Evangelio.



---

## Tabelvortoj pri la Agoj de la Apostoloj

Kiu kiam kie kiel kial verkis la Agojn de la Apostoloj?

Prelego dum virtualaj Bibliaj Tagoj en februaro 2021

Wolfram ROHLOFF, DE

Daŭrigo de antaŭa numero

### Parto 2: Kiam, kie, kiel, kial...?

Kiam li verkis sian duoblan verkon?  
En Luko 21,20 Luko citas profetaĵon pri la detruo de Jerusalemo. Laŭ la kunteksto Luko komprenis la vorton de Jesuo kiel jam plenumitan profetaĵon. Tio signifas, ke Luko verkis la librojn post la jaro 70, kiam okazis la konkero kaj detruo de Jerusalemo per la romia armeo.

Aliflanke Luko havas — malkiel ekzemple la lasta libro de la Biblio, la Apokalipso — pozitivan bildon pri la romia ŝtato. Plurloke li priskribas pozi-

tive la kontaktojn kun ŝtataj, romiaj oficistoj, ekzemple:

- Kornelio, la Centestro de la itala Kohorto en Cezareo (Agoj 10,1);
- Sergio Paŭlo, la romia prokonsulo sur la insulo Kipro (Agoj 13, 4ss<sup>†</sup>);
- Klaŭdio Lisias, ĉefkapitano (Agoj 23),
- Felikso kaj Festo, provincestroj (Agoj 24ss) aŭ eĉ
- Julio, Centestro el la Aŭgusta Kohorto, kiu transportis la malliberulon Paŭlo al Romo (Agoj 27).

---

<sup>†</sup> En la teksto la jena skribmaniero estas uzata, ekz Agoj 13, 4ss. Tiu "ss" signifas "kaj sekvontaj versikloj", kaj simpla "s" signifas "sekvonta versiklo". /red

Verŝajne Luko ankoraŭ ne spertis la kruelajn persekutojn kontraŭ kristanoj, kiuj okazis dum la regado de la imperiestro Domitian, kiu iĝis imperiestro en la jaro 81.

Do ni supozu, ke Luko verkis sian duoblan verkon ĉirkaŭ la jaro 80 post Kristo.

### Kie Luko verkis?

Eblas diversaj lokoj: Antioĥia estas centra urbo en la historio. Paŭlo tie dum longa tempo vivis kaj estis elsendita al sia unua misia vojaĝo de la eklezio de Antioĥia: Agoj 13, 1ss

*1 Kaj en Antioĥia, en la tiea eklezio, estis profetoj kaj instruistoj, Barnabas, kaj Simeon, nomata Niger, kaj Lucio, la Kirenano, kaj Manaen, kunvartito de la tetraĥo Herodo, kaj Saŭlo. 2 Kaj dum ili faris servon al la Sinjoro kaj fastis, la Sankta Spirito diris: Apartigu al mi Barnabason kaj Saŭlon por tiu laboro, al kiu mi ilin vokis. 3 Tiam, fastinte kaj preĝinte kaj metinte sur ilin la manojn, ili forsendis ilin. 4 Kaj ĉi tiuj, forkondukite de la Sankta Spirito, malsupreniris al Seleŭkia; kaj de tie ili ŝipiris al Kipro.*

...

Luko verŝajne en aŭ el Antioĥia ankaŭ akiris detalajn informojn pri la vivo de Paŭlo.

Tamen mi preferas la hipotezon, ke li ĝin verkis en Romo. Eble vi jam miris, kial la verko iom nebule finas per la vortoj:

*30 Kaj li [Paŭlo] loĝadis tutajn du jarojn en sia propra loĝejo, kaj li akceptis ĉiujn, kiuj eniris al li, 31*

*predikante la regnon de Dio, kaj instruante la aferojn pri la Sinjoro Jesuo Kristo kun plena malhelpate de neniu.*

Li ne priskribis la martiran morton de Paŭlo en Romo ĉirkaŭ la jaro 62 aŭ 64. Verŝajne Luko kiel ĉiuj romaj kristanoj sciis la kruelan mortigon de Paŭlo kaj ne bezonis priskribi ĝin.

Ŝajnas aliflanke, ke Luko precize konas la situacion de la kristanoj en Romo kaj iliajn interkristanajn problemojn. Tial mi (kiel la plimulto de la sciencistoj) supozas, ke Luko vivis kaj verkis en Romo.

### Kiel Luko verkis sian verkon?

Mi volas citi kaj kompari la komencajn kvar versiklojn de la evangelio laŭ Luko (Luko 1, 1–4). Vidu la apudan tabelon!

Alivorte: Luko ne estis la unua, kiu verkis libron pri Jesuo. Li konscias pri tio kaj laboris kiel tiutempa historiisto:

Luko serĉis fontojn, kaj buŝajn kaj skribajn. Li uzis ilin, ĉerpis el ili kaj analizis ilin. Poste li ordigis la materialon kaj provis rekonstrui kronologian sinsekvon de okazintaĵoj. Tial li, kaj nur li inter la evangeliistoj, per mencioj de samtempuloj (ekzemple Luk 2,1s) rekte ligas la rakontitan historion de Jesuo kaj la eklezio kun la historio de la romia imperio.

### Kiujn fontojn li uzis?

Por la evangelio li uzis la evangelion de Marko, kiun li prilaboris, skriban fonton kun plejparte Jesuaj vortoj, la tiel nomata sentenca fonto, germane *Logienquelle*. Krom tio li uzis aliajn skribajn kaj bu-



ŝajn rakontojn, kiujn ni nur konas per li.

Pli malfacilas ion diri pri la fontoj por la Agoj:

- Eble li konis la leteron de Paŭlo al la Romanoj, sed tio ne tute certas. Kolekto de la leteroj de Paŭlo ankoraŭ ne ekzistis tiutempe.
- Verŝajne li el Antioĥia havis skribajn informojn pri la unua misia vojaĝo de Paŭlo (Agoj 13s).
- La “ni-raportoj” inter la 16a kaj 21a ĉapitro baziĝas verŝajne sur voj- kaj staci-listo de la misia agado de Paŭlo apud la Egea Maro.
- La “ni-raportoj” pri la vojaĝo al Romo baziĝas sur informoj de kristana kunvojaĝanto de Paŭlo.

Pri kelkaj kunvojaĝantoj kaj aliaj oficialaj kunsenditoj ni ion ekscias en la Agoj, ekzemple pri Trofimo el Efeso, kiu kunvojaĝis al Jerusalemo, Agoj 21,27–29:

*27 Kaj kiam la sep tagoj preskaŭ finiĝis, la Judoj el Azio, vidinte lin en la templo, incitis la tutan homamason, kaj lin kaptis, 28 ekkriante: Izraelidoj, helpu: Jen estas la viro, kiu ĉie instruadas ĉiujn kontraŭ la popolo kaj la leĝo kaj ĉi tiu loko, kaj ankaŭ li kondukis Grekojn en la templon kaj profanis ĉi tiun sanktan lokon. 29 Ĉar ili antaŭe vidis kun li en la urbo la Efesianon Trofimo; kaj ili supozis, ke Paŭlo kondukis lin en la templon.*

Greka teksto laŭ Nestle-Aland	La “Londona” Biblio	Greke imitanta traduko de mi
1 Ἐπειδὴ περ πολλοὶ ἐπεχείρησαν ἀνατάξασθαι διήγησιν περὶ τῶν πεπληροφορημένων ἐν ἡμῖν πραγμάτων,	1 Ĉar multaj jam entreprenis aranĝi historion pri la faktoj, kiuj estas konstatitaj inter ni,	1 Ĉar multaj jam entreprenis komponi prezenton/historion pri la aferoj, kiuj estas konstatitaj inter ni,
2 καθὼς παρέδοσαν ἡμῖν οἱ ἀπ’ ἀρχῆς αὐτόπται καὶ ὑπηρέται γενόμενοι τοῦ λόγου,	2 kiel ilin transdonis al ni tiuj, kiuj de la komenco vidis mem kaj estis administrantoj de la vorto,	2 kiel transdonis al ni tiuj, kiuj de la komenco okul-atestantoj kaj servistoj fariĝis de la vorto,
3 ἔδοξεν κάμοι παρηκολουθηκῶτι ἄνωθεν πᾶσιν ἀκριβῶς καθεξῆς σοι γράψαι, κράτιστε Θεόφιλε,	3 ŝajnis bone ankaŭ al mi, esplorinta ĉion atente de la komenco, skribi en ordo al vi, plej eminenta Teofilo,	3 mi ankaŭ decidis post kiam mi funde esploris de la komenco ĉion ekzakte laŭ sinsekvo por Vi (pri)skribi, plej eminenta Teofilo,
4 ἵνα ἐπιγνῶς περὶ ὅν κατηχήθης λόγων τὴν ἀσφάλειαν.	4 por ke vi povu scii la certecon pri la aferoj, pri kiuj vi estas instruita.	4 por ke Vi ekkonu la certecon de la vortoj, pri kiuj vi estis instruitaj

Dum la revojaĝo de Makedonio al Azio, Agoj 20, 4, multaj kristanoj akompanis lin:

*4 Kaj ĝis Azio akompanis lin Sopater el Berea, la filo de Pirho; kaj el la Tesalonikanoj, Aristarĥo kaj Sekundo; kaj Gajo el Derbe, kaj Timoteo; kaj Tiĥiko kaj Trofimo, Azianoj.*

Luko ankaŭ uzis buŝajn rakontojn, anekdotecajn pri gravaj personoj el la frua kristanismo:

- Petro: Agoj 3 ĝis 12
- Barnabas Agoj 4, 36s
- Filipo Agoj 8;
- Paŭlo, multloke, rigardu ekzemple la popularan rakonton pri la konvertiĝo Agoj 9, 1–22. Ĝi okazis ĉirkaŭ la jaro 33 post Kristo. (Komparu tiun popularan rakonton kun la mallongaj vortoj de Paŭlo pri ĝi en la letero al la Galatoj 1, 15–17 kaj en la letero al la Koritanoj 9,1 kaj 15,8)

Kial Luko penis verki, se ja aliaj jam finis similajn verkojn?

En la komenco de la evangelio Luko dediĉas la verkon al Teofilo. Li verŝajne estis riĉa persono, kiu pagis la grandan koston por kopiado kaj disvastigado de la verko. En tiu antaŭparolo Luko mencias, ke li verkis ĉion,

*4por ke Vi ekkonu la certecon de la vortoj, pri kiuj vi estis instruitaj.*

Luko volas montri al Teofilo kaj al aliaj “Di-amikoj” kaj Di-serĉantoj, ke kristanoj ne sekvas ian sen-historian fabelon, sed sekvas Jesuon Kriston, kiu estis vera homo, vere naskiĝis, vere vivis, vere suferis, vere mortis, kaj ... vere vivas de eterno al eterno. Por li la

historio de Jesuo ne estas malaktual-iginta pasintaĵo. Tion Luko montras per sia daŭrigo de la Evangelio per la Agoj de la Apostoloj.

Se vi legas la Agojn, atentu kiom ofte la Sankta Spirito estas menciita de Luko: La Spirito de Dio estas la ĉefa aganto en tiu libro. Tial estus trafe doni al la Agoj de la Apostoloj la nomon *Agoj de la Sankta Spirito*.

Sed kial li tiom ofte emfazas la agadon de la Sankta Spirito? Per tio li montras, ke ni post la morto kaj releviĝo kaj finfine post la ĉieliro de Jesuo Kristo ne estas orfaj. Dio per sia spirito restas en nia ĉiutaga vivo. En la Agoj de la Apostoloj en multaj facetoj kaj rakontoj videblas, kiom gravas por Luko la ideo, ke Dio mem ĉeestas per sia Spirito ankaŭ nun en la vivo de la kristanoj kaj de la eklezio.

La komponado de la Agoj

Mi volas skizi la komponadon de la Agoj. Por tio mi citas versiklon ok el unua ĉapitro de la Agoj. Jesuo adiaŭas de siaj disĉiploj dirante antaŭ sia ĉieliro:

*8 Sed vi ricevos povon, kiam la Sankta Spirito venos sur vin; kaj vi estos miaj atestantoj en Jerusalemo kaj en la tuta Judujo kaj Samario kaj ĝis la plej malproksima parto de la tero.*

La versiklo montras geografian dispartigon: La historio komencas en Jerusalemo, de tie disvastiĝas ĝis la tuta Judujo kaj Samario kaj fine atingas eĉ la limojn de la tero. Tiun tri-partan ankaŭ transprenis kaj mencias la esperantlingva eldono 2006 per superskriboj en la teksto:

- Enkonduko: 1,1–11;
- Parto I: en Jerusalemo: 1,12–8,3;
- Parto II: 8,4–12,23 = en la tuta Judujo kaj Samario;
- Parto III: 12,24–28,31: ĝis la plej malproksima parto de la tero.

Tamen en la sekva tabelo mi volas proponi alternativan strukturigon laŭ la sama ideo, ke Luko strukturigas la rakonton laŭ geografiaj regionoj. La teksto de la Agoj enhavas kelkajn versiklojn, kiuj indikas sukcesan finon, de antaŭ ĝi menciita “epoko”, aŭ komencon de nova “epoko” de la misia agado:

Antaŭparolo kaj ordono de la resurektinta Jesuo,

1,1–26

Signala versiklo: 1,26

*Kaj ili lotis pri tio, kaj la loto falis por Mattiaso; kaj li estis alkalkulita al la dek unu apostoloj.*

Parto I: Pentekosto kaj la sekvoj aŭ La komenca tempo de la eklezio en Jerusalemo 2,1 – 5,42

Signala versiklo: 5,42

*Kaj ĉiutage en la templo kaj dome ili ne ĉesis instrui kaj prediki Jesuon, la Kriston.*

Parto II: La disvastiĝo de la eklezio en Judujo kaj Samario

(7 diakonoj, Stefano, persekuto, Filipo, Saŭlo en Damasko kaj Jerusalemo),

6,1 – 9,31

Signala versiklo: 9,31

*Kaj la eklezio tra la tuta Judujo kaj Galileo kaj Samario havis pacon kaj*

*ricevis edifon; kaj iradante en la timo de la Sinjoro kaj en la konsolo de la Sankta Spirito, ĝi kreskis.*

Parto III: Paŭlo, Antioĥia kaj la komencoj de la pagana kristanismo

(Petro misias: ... centestro Kornelio...) 9,32–15,35

Signala versiklo: 15,35 ĝis fino de la apostola kunveno:

*Sed Paŭlo kaj Barnabas restis en Antioĥia, instruante kaj predikante, kun multaj aliaj, la vorton de la Sinjoro.*

Parto IV: La misio de Paŭlo en malgranda Azio kaj Grekujo,

15,36–19,20

Signala versiklo: 19,21 ĝis solena decido de Paŭlo vojaĝi al Romo:

*Kaj kiam tio finiĝis, Paŭlo intencis en la spirito, trapasinte Makedonujon kaj la Aĥajan landon, vojaĝi al Jerusalemo, kaj li diris: Post kiam mi iros tien, mi devos ankaŭ vidi Romon.*

Parto V: Paŭlo, atestanto de la Evangelio inter Jerusalemo kaj Romo,

19,21–28,31

Signala versiklo: 28, 30–31

*30 Kaj li loĝadis tutajn du jarojn en sia propra loĝejo, kaj li akceptis ĉiujn, kiuj eniris al li, 31 predikante la regnon de Dio, kaj instruante la aferojn pri la Sinjoro Jesuo Kristo kun plena mal-timo, malhelpate de neniu.*

Ekzemplo el la Luko-teologio: La samvaloreco de virinoj

Luko, ankaŭ se li verŝajne ne estis kunvojaĝanto de Paŭlo, en alia senco estis

lernanto de li. Tio videblas en diversaj detaloj, ekzemple kiel li emfazas la rolon de virinoj.

Kaj en la orienta, greklingva parto kaj en la okcidenta, latinlingva parto de la romia imperio, virinoj estis malegalrangaj al viroj. Tradicie en “Grekio” honorinda virino, edzino ne videbligis sin ekster sia domo. Virinoj ne memstare povis kontrakti pri negocoj, ilia vorto antaŭ tribunalo estis senvalora, ŝi ne ricevis heredon, se parenco eĉ edzo mortis. Por la klasika, grekia antikveco eblas rezumi, ke virino en kazo, ke heredaĵo estis postlasata, ne heredis sed eĉ male estis parto de la postlasaĵo, kiu transiris al nova “posedanto”.

(Tiu tradicio ĝis hodiaŭ videblas en “holivudaj” filmoj: Tie dum geedziĝa ceremonio eksposedinto de la virino (= patro) transdonas la posedaĵon (= filino) al ĝia nova posedanto (= edzo). ☺ )

Certe en postaj tempoj, grekaj virinoj havis pli da rajtoj kaj eblecoj. Sed ankaŭ en la pli malsevera romia, latinlingva kulturo laŭ civila juro virinoj estis dum sia vivtempo ĉiam sub la kuratoreco aŭ de sia patro aŭ de sia edzo aŭ alia vira parenco, ekzemple propra filo aŭ frato.

Iam virinoj akiris rajton administrisian personan posedaĵon. Pli poste imperiestro Aŭgusto ordonis, ke virino liberiĝos de vira “protekto” (la: *tutela*), post kiam ŝi naskis almenaŭ 3 infanojn. Nur en la frua epoko de la imperiestroj romiaj virinoj akiris — laŭ civila juro — juran plenaĝecon. Tamen ili neniam povis rekte influi politikon kaj socion. Ilia kutima viv- kaj influ-sfero estis ilia dom(anar)o kaj la edukado de iliaj

infanoj. (Tie ĉi mi nur notas, ke virinoj estante patrino aŭ edzino k.t.p. de “granda domo”, de potenculo, de imperiestro, certe influis la politikon estante edzino, patrino ... de potenca viro.)

Jesuo mem traktis virinojn ne laŭ la tiama kutimo. Luko en sia evangelio mencias nomojn de virinoj, kiuj estis kun la 12 disĉiploj kaj sekvis Jesuon, Luko 8, 1–3:

*1 Kaj post ne longe li vojiradis tra urboj kaj vilaĝoj, predikante kaj alportante la evangelion de la regno de Dio, kaj kun li la dek du, 2 kaj iuj virinoj, kiuj estis resanigitaj je malbonaj spiritoj kaj malsanoj: Maria, kiu estis nomata Magdalena, el kiu eliris sep demonoj, 3 kaj Joana, edzino de Ĥuzas, la ĉambelano de Herodo, kaj Susana, kaj multaj aliaj, kiuj faris al ili helpan servadon per sia havo.*

Por multaj tio verŝajne estis skandalo! (La esprimo *faris al ili helpan servadon* [la greka verbo estas *diakonein*, servi] similas aŭ alludas al la ofico de “diakono”).

Simile en Luko 10, 38–42 pri Marta kaj Maria aperas la verbo *diakonein*. Tie Jesuo ne resendas Maria al la “ŝia natura, virina” pozicio aŭ loko, sed permesas al Maria kontraŭ la peto de ŝia fratino Marta, agi, kvazaŭ Maria estus (vira) sekvanto kaj disĉiplo de Jesuo.

Hedwig Fisher en sia prelego pri Feminisma Teologio dum la Retaj Bibliaj Tagoj 2021 jam menciis, ke Paŭlo en sia letero al la Romianoj eĉ nomas virinon Apostolo (Rom 16, 7):

*7 Salutu Andronikon kaj Junian, miajn parencojn kaj miajn kunkaptitojn, kiuj estas konataj inter la apostoloj, kaj ankaŭ estis en Kristo antaŭ ol mi.*

La tradicia esperantlingva traduko same kiel multaj nacilingvaj tradukoj erare ŝajngigas ke temas pri viro “Junio”. La gramatik-teorie eblaj viraj nomformoj “Junias” aŭ “Marias” neniam ekzistis, nur la virinaj nomoj “Junia” respektive “Maria”.

Mi per ekzemplo el la Agoj volas prezenti, ke en frua kristanismo gravis la ideo de egalvaloreco de virinoj. Por tio mi volas komenti el la Agoj ĉapitron 16, 6 ĝis 15. Kaj vi eĉ lernos, ke foje ankaŭ Paŭlo kaj la aliaj disĉiploj kaj kristanoj devis lerni praktikadon de tiu egalvaloreco de kaj viroj kaj virinoj, grekoj kaj judoj, riĉuloj kaj malriĉuloj. ☺

Mi proponas, ke vi unue legu ĉapitron 16,6–15 el la Agoj. Eble rigardu sur mapo pri la vojaĝo de Paŭlo la situon de la menciitaj urboj en Grekio kaj Malgrandazio. Poste komparu la legitajn versiklojn kun miaj sekvaj komentoj pri ili.

### versikloj 6-8

La Sankta Spirito, la Spirito de Jesuo ne permesas al Paŭlo kaj liaj sekvantoj iri al certaj regionoj de Malgrandazio. Ili eble estas embarasitaj, senkonsilaj, ĉar ili ne scias, kien ili iru, nur kien ne. Iam ili alvenas en Troas, havena urbo.

### versikloj 9-10

Per vizio Paŭlo komprenas, ke li iru al la eŭropa Makedonujo: Li vidis viron

makedonan, kiu petegis lin: Transpasu al Makedonujo kaj helpu nin!

### versiklo 11

Ke Dio subtenas la vojaĝon videblas jam per la mallonga vojaĝtempo: Jam la sekvan tagon ili alvenis en Neapolis kaj de tie daŭrigis piede al Filipi. Kompare en Agoj 20, 6 revojaĝo de Neapolis al Troas daŭris 5 tagojn.

### versiklo 12

Filipi estas romia kolonio, ĉefurbo de la Makedona Provinco, re-fondita en la jaro 167 antaŭ Kristo. Apud ĝi dum la intercivitana milito Oktavio (Aŭgusto) kaj Antonio venkis la murdintojn de Cezaro. Tiu kolonio havas certajn privilegiojn: italan juron cetere pli favoran por virinoj, memadministradon, liberecon de ĉiuj devigaj tributoj. Granda parto de la enloĝantoj konsistas el romiaj (eks-)soldatoj, kiuj tie trovis sian novan loĝlokon kaj hejmurbon.

Dum kelkaj tagoj Paŭlo kaj liaj kunvojaĝantoj tie restas, sed nenio okazas: Nek troviĝas sinagogo nek alia elirpunkto de misia agado. (Kutime Paŭlo komencis prediki la evangelion en sinagogoj.) Eĉ la grekaj, imperfektaj verbformoj por “ni restis” substrekas la daŭron, la malrapidan fluon de la tempo. Paŭlo en la vizio estis vokita de makedona viro. Lin li nenie vidas. Ĉu erare ili iris ĉi tien? Tiu viro nenie videblas!

### versiklo 13

Tiu rivero Gangitis, situas 2 kilometrojn ekster de la urbo. Tien ili iras, supozante,

ke tie kunvenas homoj por preĝi al la (juda) Dio. Ili ne eraras, sed ..., nur kunvenas virinoj! Ĉu malsukceso? Kie restas la makedona viro?

#### versiklo 14

Lidia estas adorantino de Dio, do ne juda virino, kiu simpatiis kun la juda religio kaj ĝin iom praktikis.

Ŝi venas el Tiatiro, urbo en la lando Lidio en Malgrandazio. Eble “Lidia” ne estis ŝia “vera” nomo, sed la nomo, per kiu oni ŝin vokis en Filipino: “Lidia”, do virino el Lidio. En sia letero al la Filipinoj en 4,2 Paŭlo ne mencias iun Lidian, sed admonas du virinojn al paco Eŭdioan kaj Sintihen. Ĉu eble unu el tiuj du estis Lidia? Ni ne scias, sed eblas.

Denove la “imperfekta” verbformo “aŭskultis” estas interesa. Mi ŝatus traduki “estis aŭskultanta”. Tiu verbformo indikas pli longan tempon da aŭskultado aŭ kelkajn fojojn, kiam ŝi aŭskultis la predikojn, do eble kelkajn sabatojn.

Sed la Sinjoro malfermis al ŝi la koron!

La Spirito sendis kaj gvidis Paŭlon al Eŭropo, al tiu virino el malgranda Azio, por ke ŝi estu la unua kristano en Eŭropo, pri kiu ni scias.

#### versiklo 15

Ŝi estis baptita kun sia familio, laŭvorte: kun sia domo. Lidia ŝajne ne nur estas riĉa, sed ankaŭ havas la rangon de *pater familias*, de vira estro de iu domo/familio. Tiu rajtas decidi al kiu religio apartenu la “domo”, do tiuj, kiuj apartenas kaj loĝas en la domo, ĉu plenkreskaj familianoj, ĉu infanoj, ĉu

sklavoj. Tial Lidia ordonas bapti sin kun sia tuta dom(anar)o.

Lidia efektive estas energiplena virino! Ŝi eĉ devigas la misiistojn, esti ŝiaj (do de ŝi, Lidia) gastoj, loĝi en ŝia domo dum ilia restado en Filipinoj.

Kial Paŭlo kaj la aliaj komence ne volis esti la gastoj de ŝi? Eblas diversaj motivoj:

- por eviti onidirojn — se fraŭla viro estas gasto ĉe (ĉu senedza?) virino —,
- pro religiaj motivoj — ĉar ŝi ja ne estas juda —,
- ĉar Paŭlo volis esti memstara misiisto, kiu vivas per sia propra laboro kaj ne de mondonacoj de aliaj (nur de du eklezioj, unu el ili estis tiu de Filipinoj, Paŭlo akceptis poste monan subtenon.),
- ...

Sed Lidia devigas lin esti ŝia gasto. Tiel Paŭlo montras, ke ŝi vere estas kristano, fidela al la Sinjoro, kaj ke la diferencoj inter homoj por Dio kaj por la servantoj de Jesuo ne plu havas decidan valoron, aŭ kiel Paŭlo skribas alivorte (Galatoj 3, 28):

*Ne estas ja Judo nek Greko, ne estas sklavo nek liberulo, ne estas ja vira kaj virina; ĉar vi ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo.*

Interese, ke la unua eŭropa kristano estis ne-eŭropdevena, energiplena virino. Kaj tiu Lidia eĉ instruis al Paŭlo praktike vivi sian predikon pri egaleco de ĉiuj kristanoj.

Do: En la Agoj troviĝas multaj trezoroj, kiuj indas esti malkovrataj!

Nun ekstudu! ❧

# Biologia plureco – propreco kaj unu el la kondiĉoj de la vivo

Oldřich Arnošt FISCHER, CZ

**P**ri biologia plureco oni estas bone informitaj. En televido kaj filmoj pri naturo spektantoj povas vidi kaj admiri diversajn ekologiajn sistemojn, al kiuj apartenas dezertoj, koralaj rifoj, marĉoj, pluvaj praarbaroj, paŝtejoj, urbaj parkoj kaj kultivejoj. En ekologia sistemo ĉiu besto, planto aŭ mikroorganismo havas sian lokon. La sistemo estas valora, se ĝi enhavas multe da diversaj specioj.

Diligentaj natursciencistoj trovis, nomis kaj priskribis multe da bestoj, plantoj kaj mikroorganismoj. La plureco jam estas studata eĉ sur nivelo de genoj. Sed spite de fervora laboro, homaro nun konas nur unu dekonon de vivantaj organismoj. Ankoraŭ ekzistas nekonataj bestoj kaj plantoj, kies proprecojn kaj utilon, ni ne konas, ekzemple nekonataj kuracherboj.

Televido ne montras, ke ekologia sistemo estas ne nur tropika praarbaro, sed ekzemple via buŝa kavo. Amaso da mikroorganismoj ĝin ĉiutage purigas helpante al ĝia bona sanstato. Sed iu ajn perturbo de buŝa ekologia sistemo kaŭzas ŝanĝon de mikroorganisma plureco. En buŝa kavo eksuperos la mikroorganismoj, kiuj kaŭzas ekzemple malodoron.

Ankaŭ en viaj intestoj kunvivas multe da mikroorganismoj. Plimulto el ili estas utila. Ekzemple la bakterio *Escherichia coli* produktas vitaminon K,

kiun via organismo bezonas. En normalaj kondiĉoj intesta sistemo bone funkcias, sed ĝin povas perturbi ekzemple infektoj per virusoj aŭ patogenaj stamoj de *Escherichia coli*, salmoneloj, ŝigeloj kaj aliaj bakterioj, kiuj kaŭzas intestajn inflamojn (enteritojn), kies simptomoj estas laksoj. La perturbon povas kaŭzi ankaŭ malbona nutraĵo (grasoj kune kun dolĉaĵoj, multe da salo, alkoholo). Uzado de antibiotikoj intestan ekologian sistemon perturbas, ĉar amaso da bakterioj (eĉ amaso da utilaj bakterioj) pereas. Pro tio kuracistoj rekomendas post fino de antibiotika terapio manĝi jogurtojn, por ke jogurtaj bifidobakterioj kaj laktobakterioj defendu vian intestan mukozon kaj helpu al renoviĝo de harmonio, utila pluraleco de intesta ekologia sistemo.

Ĉe remaĉuloj, kiuj havas tri antaŭstomakojn, la antaŭstomaka ekologia sistemo ebligas uzi kiel nutraĵon eĉ nedigesteblan celulozon. Ekzemple bovo kapablas forvori paperan ĵurnalon kaj uzi ĝin por produktado de lakto. Kiel? En la unua antaŭstomako, la rumeno, biologia inkubatoro, kiu havas la entenon 200 litrojn, konstantan temperaturon kaj regulan kirladon de remaĉita planta nutraĵo, vivas grandega amaso da simbiozantaj bakterioj kaj protozoj. En unu mililitro de rumena fluidaĵo troviĝas ĉirkaŭ  $10^8 - 10^{12}$  bakterioj kaj  $10^6$  proto-

zooj. La rumenaj bakterioj, kiuj vivas en simbiozo kun la bovo, estas specialistoj, kiuj kapablas spliti celulozon, sed ankaŭ amelon kaj ureon (karbamidon), kaj produkti volatilajn grasajn acidojn (la acetacidon, propanacidon kaj butanacidon), de kiuj bova organismo kapablas krei laktan grason. La protozooj voras la bakteriojn kaj kreas de ili proteinojn de siaj korpoj. Poste ili estas digestitaj. La bovo estas herbovorulo, sed paradokse ĝi nutriĝas per protozoa viando. Se la bovo havus neniun mikrofloron kaj mikrofaŭnon en siaj antaŭstomakoj, stomako kaj intestoj, ĝi mortus de malsato, ĉar ĝi ne kapablas plantojn digesti. Similaj sistemoj estis trovitaj ankaŭ ĉe aliaj herbovoruloj (ekzemple ĉevaloj, kunikloj kaj leporoj), kiuj havas siajn simbiotajn mikroorganismojn en dikaj intestoj kaj cekumoj. Bredantoj de bovoj tiel uzas servon de ekologia sistemo de bova organismo.

Danke al la biologia diverseco, la homaro povas uzadi la servojn de multaj ekologiaj sistemoj, por akiri nutraĵojn, loĝejojn, trinkeblan akvon, energiajn fontojn, krudmaterialojn, kuracilojn k. a.

Ĉu homoj ĉiam kondukis al ekologiaj sistemoj dankeme kaj saĝe?

Ekde la jaro 1600 ĝis la jaro 2000 formortis ĉirkaŭ 500 bestaj specioj kaj 600 plantaj specioj. Oni science priskribis nur 10 % da specioj, kiuj vivas sur tiu ĉi planedo, tial oni povas supozi, ke la vera nombro de elmortitaj specioj (inkluzive de la specioj, kiujn sciencistoj eĉ ne sukcesis nomigi kaj priskribi) estas ĉirkaŭ 10 000.

Jam en pratempo okazis formortado de plantaj kaj bestaj specioj, kio estis kaŭzata per vulkanaj erupcioj, ĥemiaj veneniĝoj de akvo, faloj de meteoritoj, sed danke al biologia plureco ĉiam kelkaj specioj transvivis kaj damaĝitaj ekologiaj sistemoj renoviĝis, nur en iel ŝanĝitaj formoj. Multaj organismoj formortis, sed la vivo venkis. Sed nuntempa formortado de specioj, kiun kaŭzas precipe homa agado, okazas tiel rapide kaj intense, ke povas formorti eĉ tuta homaro.

Homa agado endanĝerigas 99 % da endanĝerigitaj specioj.

Post la jaro 1948 en socialisma Ĉeĥoslovakio laŭ sovetaĵ instruicioj komenĉiĝis unuigo de kampoj. Krom gravaj socialaj kaj politikaj problemoj ĝi kaŭzis neniigon de ekosistemoj de kampetoj, kiuj estis apartigitaj per kampolimoj kaj bosketoj. Kelkaj specioj adaptiĝis, sed aliaj tute aŭ preskaŭ formortis. Nuntempe vi en grenkampoj ne trovas belan ruĝan floran agrostemon (*Agrostemma githago*). Raraj estas koturnoj (*Coturnix coturnix*) kaj perdrikoj (*Perdix perdix*). Zizelo (*Spermophilus citellus*) troviĝas nur en kelkaj izolitaj populacioj. En unuigitaj kampoj estas uzataj pezaj agrikulturistaj maŝinoj, kiuj premas kultivatan tertavolon. Uzado de pesticidoj kaj ne uzado de stalaj sterkaĵoj kaŭzas mankon de lumbrikoj, la vermoj, kiuj fekundigas kaj pere de siaj koridoretoj malfirmigas la tertavolon. Ofte abeloj kaj burdoj, kiuj estas la plej signifaj polenantoj de plantoj, estas venenigitaj de insekticidoj. La kampoj



suferas de akvaj kaj ventaj erozioj, sed paradokse rapide perdas pluvan akvon. Pro tio nun progresemaj agrikulturistoj revenas al pli ekologia mastrumado renovigante bosketojn. Ili scias, ke plibonigo de vivkondiĉoj de abeloj kaj aliaj polenantoj helpas al akiro de pli grandaj rikoltoj.

Biotopoj estas neniigitaj ankaŭ per konstruado. Jam unu dekonon de teritorio de Ĉeĥa Respubliko kovras konstruaĵoj. Precipe grandegaj stokejoj de diversaj komercaj ĉenoj estas konstruitaj sur kampa kultivata tertavolo.

Ankaŭ preferado de unu planta aŭ besta specio estas danĝera.

En Ĉeĥa Respubliko ni nun travivas skolitan plagon. La skolitoj, la skaraboj *Ips typographus* kaj *Ips duplicatus*, damaĝas pingloarbojn. Skolita masklo atakas la arbon kaj sub ŝelo li preparas kopulacian ĉambreton. Se li ne dronos en abunda fluida rezino, per kiu la arbo defendiĝas, al ĝi alflugas femaloj. Post kopulacio la femaloj boras koridoretojn kaj flanke metas siajn ovojn. Elkoviĝintaj larvoj boras siajn proprajn koridoretojn. Ili grave damaĝas arban baston. Tial la arbo velkas. Se en la arbaroj estus miksaĵo de pingloarboj kun foliarboj, la skolitoj ne tre facile plimultiĝus. Bedaŭrinde posedantoj preferis planti unuspecajn arbarojn de piceoj, kies trunkoj rapide kreskas kaj estas facile prilaboreblaj. Pingloarbaroj kun unu arba specio, la piceo *Picea abies*, estas la lokoj, en kiuj facile disvastiĝas insektaj damaĝantoj al la piceoj kaj aliaj pingloarboj. Plivarmiĝita klimato al la skolitoj

helpis. Ili tre plimultiĝis kaj atakis eĉ junajn, sanajn pingloarbojn, kiuj ne kapablis defendi sin kontraŭ grandega amaso de skolitaj atakantoj. Ekde la jaro 2003 la skolita plago kaŭzis perdon de triono da arbaroj de Ĉeĥa Respubliko. En miksitaj arbaroj, kie kune kreskas multe da arbaj specioj, la damaĝantoj de pingloarboj (skolitoj, la nokta papilio *Lymantria monacha* k. a.) ne kapablas facile disvastiĝi. Samtempe ne kapablas facile disvastiĝi damaĝantoj de foliarboj (ekzemple la nokta papilio *Lymantria dispar*).

Neadekvata ekspluatado de minejoj, poluado de vivmedio, enorma ĉasado de bestoj kaj kolektado de plantoj endanĝerigas multajn ekologiajn sistemojn. Ne nur ĉasado, sed ankaŭ malsaĝa preferado de kelkaj elektitaj specioj ekstermigas aliajn speciojn. Ekzemple ĉasistoj artefarite plimultiĝas sovaĝan anason platbekan (*Anas platyrhynchos*, vidu suban bildon), por havi riĉajn ĉasaĵojn.



Abundaj anasoj, elkoviĝintaj en inkubatoroj kaj en plenkreskeco liberigitaj, laŭvorte terorizas aliajn speciojn de sovaĝaj akvaj birdoj, ĉar ili neniigas iliajn flosantaj nestojn, kiel senskrupulaj konkurantoj forvoras ilian nutraĵon kaj faras bruon. Al la ĉasistoj tiuj homogenaj unuspecaj populacioj de

anasoj plaĉas, ĉar ili havas kion ĉasi, sed aliaj akvaj birdoj, inkluzive de raraj birdaj specioj, formortas.

Neoriginaj specioj estas tre danĝeraj. Listo de neoriginaj specioj, kiuj aperis en Ĉeĥa Respubliko jam enhavas nomojn de pli ol 1 454 neoriginaj plantaj specioj kaj 595 neoriginaj bestaj specioj. Neorigina specio estas ekzemple supre menciita kaŭzanto de skolita plago *Ips duplicatus*, kiuj disvastiĝis en centran Eŭropon el Skandinavio kaj Pollando.

En la fino de la 20-a jarcento el Ameriko estis importitaj du neoriginaj astakoj: *Pacifastacus leniusculus* (vidu suban bildon) kaj *Orsonectes limosus*. Ambaŭ specioj transmisiis astakan peston, kies kaŭzanto estas la fungo



*Aphanomyces astaci*. Amerikaj astakoj, la transmisiantoj, estas kontraŭ la astaka pesto rezistaj. Eŭropaj astakoj *Astacus astacus*, *Austropotamobius torrentinus* kaj azia astako *Astacus leptodactylus* malsaniĝas. La fungo atakas iliajn nervajn sistemojn, tial la astakoj mortas suferante de kramfoj. La fungo kreas rezistajn sporojn, kiuj kapablas multajn jarojn transvivi en ŝlimo kaj ataki novajn astakajn populaciojn.

Neorigina planto estas ekzemple herakleo (*Heracleum mantegazzianum*),

kiu devenas el Kaŭkazo. Ĝi aspektas kiel giganta, du metrojn alta floranta karoto. La herakleoj blokas lokon en paŝtejoj kaj estas venenaj.

Naturprotektantoj batalas por biologia plureco. Internacia Unio por la Konservado de Naturo estis fondita en la jaro 1948. Ĝi arigas 83 ŝtatojn, 108 registarajn kaj 766 neregistarajn organizojn. Sed ĉu povas la biologian plurecon subteni ankaŭ neorganizataj civitanoj?

Jes. Se vi havas ĝardenon, bonvolu ne imiti anglan stilon kun malalte tonditaj gazonoj kaj basenoj kun blua (ĥemie purigita) akvo. Pli bone estas lasi en parto de via ĝardeno arbedojn, arbotrunkojn, ŝtonojn, lokojn kun netondita herbo kaj ujeton kun trinkebla akvo por abeloj kaj birdoj. Via ĝardeno fariĝu natura rifuĝejo de birdoj, erinacoj, lacertoj, araneoj, insektoj kaj aliaj interesaj vizitantoj kaj loĝantoj. Se vi konstruos basenojn, bonvolu lasi unu malgrandan baseneton “malpuran”, kun akvaj kaj marĉaj plantoj. Vi miros, kiel rapide tiun baseneton (sen fiŝoj) trovos ekzemple libeloj, akvaj skaraboj kaj aliaj interesaj vizitantoj.

Kiu ne havas propran ĝardenon, tiu povas ekzemple instali birdonutrejojn kaj nestkestojn, sed ankaŭ fari ordon kaj batali kontraŭ poluado de vivmedio.

Sed precipe trovu informojn pri biologia plureco, ekologio, roloj de bestoj kaj plantoj en ekosistemoj, kaj kun helpo de demokrate elektitaj politikistoj aktive defendu vian vivmedion. Nia planedo ne estas nur por unufoja uzado!

# Tagordo por la jarkunveno de KELI 2021

- 1 Malfermo
- 2 Elekto de kunprotokolantoj
- 3 Akcepto de la tagordo
- 4 Komunikoj
- 5 Funebra memorigo
- 6 Sekretaria jarraporto
- 7 Kasista jarraporto
- 8 Raporto de la kaskontrolantoj
- 9 Diskuto kaj akcepto de la raporto
- 10 Buĝetoj
- 11 Raporto de la redaktoro
- 12 Estrarelekto
- 13 Kongresplanoj – 2022
- 14 Proponoj kaj sugestoj de la membroj
- 15 Fermo

## Klarigoj:

(12) *Ĉi-jare finiĝas la deĵor-periodo de Václav Pospíšil, Pavel Polnický, Siegfried Krüger, Bengt Olof Åradsson kaj Ágnes Ráczkevy-Eötvös. Ĉiuj estas reelekteblaj.*

(13) *Propono pri la KELI-kongreso 2022 ne alvenis*

*Jubileoj ĉi-jaraj*

*Bengt Olof Åradsson 70 jaroj*

*Pavel Klimeš 70 jaroj*

*Petr Chrdle 75 jaroj*

*Ed Borsboom 85 jaroj*

## Rimarko 1:

Se ne povos okazi ĉi-jare kongreso en Legnica, ni petas vin, kiu estas membro, ke vi skribu letere aŭ retmesaĝe al sekretario Pavel Polnický, ĉu vi konsentas kun plilongigo de la deĵor-periodo de la estraranoj (vidu klarigon al la punkto 12 supre) ĝis la venontjara kongreso en 2022. La adresojn de la sekretario vi trovas sur paĝo 50.

## Rimarko 2:

Ĉu vi jam pagis vian membrecon kaj abonon de Dia Regno por la jaro 2021?

*Pavel Polnický*  
sekretario

**Financa raporto de KELI 2020**

(Ĉiuj sumoj en EUR)

**Bilancoj fine de la jaroj  
2019 2020****Aktivoj**

Stoko de libroj	4 925,03	4 925,03
Stoko de kasedoj, E-Misio	116,00	116,00
<i>Provizo</i>	<u>5 041,03</u>	<u>5 041,03</u>

Kasista kaso	840,00	860,00
Sekretaria kaso	1 392,00	1 611,00
UEA-konto kelk-p	27 163,05	25 047,20
Ĝir-konto, CIC-banko	450,82	570,08
Ŝpar-konto, CIC -banko	<u>22 793,21</u>	<u>22 816,96</u>
<i>Monrimedoj</i>	<u>52 639,08</u>	<u>50 905,24</u>

**Sumo de aktivoj 57 680,11 55 946,27****Pasivoj**

Kapitalo	21 564,18	33 589,47
Rezulto de la jaro	-3 136,15	-1 035,35
<i>Kapitalo entute</i>	<u>18 428,03</u>	<u>32 554,12</u>

Dumvivaj membroj	1 768,50	1 650,50
E-Misio	6 894,51	6 894,51
Helpa kaso	1 020,08	1 020,08
Kongresa rezerva kaso	823,48	823,48
Literatura/Himnara kaso	12 941,57	12 903,58
Heredaĵo de Pamela Jackson	11 161,44	0,00
Mondonaco de K.U.N.E.	<u>4 000,00</u>	<u>0,00</u>
<i>Fondusoj entute</i>	<u>38 609,58</u>	<u>23 292,15</u>

Kreditoroj	0,00	0,00
Evidente	590,00	0,00
KELI-abonoj de EK	12,50	0,00
Kongresaj kotizoj	<u>40,00</u>	<u>100,00</u>
<i>Transitaĵoj kaj pasivoj</i>	<u>642,50</u>	<u>100,00</u>

**Sumo de pasivoj 57 680,11 55 946,27**

## Klarigoj kaj rimarkoj pri la bilanco 2020.12.31

### **Aktivoj**

#### **Stokoj**

En la jaro 2020 ne ŝanĝiĝis la stokoj de libroj aŭ kasedoj.

Estraranoj komencis fari aktualan inventuron kaj reale valorigi la stokon, ke bilanco montru la veran valoron de stoko.

#### **Monrimedoj**

Kasista kaso estas ĉe Ágnes Ráczkevy-Eötvös, HU, kutime kun malalta sumo. Sekretaria kaso estas ĉe Pavel Polnický, CZ, kiu zorgas pri la presado kaj dissendado de Dia Regno.

KELI havas bankkontojn ĉe UEA (kelk-p) kaj ĉe la franca CIC banko (ĝir-kaj ŝpar-konto).

### **Pasivoj**

#### **Kapitalo**

Kapitalo enhavas la sumigitan rezulton de la antaŭaj jaroj. Laŭ la decido de la estraro, la heredaĵo de Pamela Jackson (11 161,44 Eŭroj) kaj la mondonaco de la nederlanda sekcio de KELI (4 000 Eŭroj) estis transkontigitaj al Kapitalo. Tiuj sumoj post pluraj jaroj ne plu estos aparte montritaj.

La rezulto de la jaro 2020 estis bedaŭrinde negativa: - 1 035,35 Eŭroj.

#### **Fondusoj**

Laŭ la decido de la estraro Dumvivaj membroj, E-Misio, Helpa kaso, Kongresa rezerva kaso kaj Literatura/Himnara kaso estas aparte montritaj.

#### **Transitaĵoj kaj pasivoj**

En la jaro 2020 pro la korona virusa pandemio KELI-anoj ne povis renkontiĝi, ni ne havis kongreson kaj Diservojn, pro kio ni ne kolektis monon al la fonduso Stichting Zienderogen (antaŭa Evidente).

Espereble en la sekvontaj jaroj ni denove povos helpi la laboron, kiun komencis Jacques Tuinder, NL.

La kongresaj kotizoj estas la antaŭpagitaj aliĝ- kaj kongreskotizoj, kiuj alvenis rekte al la bankkonto de KELI kaj estos ĝirataj al LKK.

## Rezulto 2020 kaj buĝetoj 2020, 2021 kaj 2022 (Ĉiuj sumoj en EUR)

	<b>Buĝeto 2020</b>	<b>Rezulto 2020</b>	<b>Buĝeto 2021</b>	<b>Buĝeto 2022</b>
<b>Enspezoj</b>				
Kotizoj/Abonoj	2 000	1 664,70	2 000	2 000
Kotiz- kaj kursdiferencoj	0	3,82	0	0
Adopta Kaso	300	70,00	300	300
<i>Kotizoj entute</i>	<u>2 300</u>	<u>1 738,52</u>	<u>2 300</u>	<u>2 300</u>
Librovendado	50	110,93	100	100
Rentumoj	150	23,75	25	25
Profito el kongreso	200	0,00	200	200
<i>Aliaj enspezoj</i>	<u>400</u>	<u>134,68</u>	<u>325</u>	<u>325</u>
<b>Enspezoj entute</b>	<b>2 700</b>	<b>1 873,20</b>	<b>2 625</b>	<b>2 625</b>
<b>Elspezoj</b>				
Presado + sendado de DR	2 600	2 801,00	2 600	2 600
Perantoj	0	0,00	0	0
<i>Revuokostoj</i>	<u>2 600</u>	<u>2 801,00</u>	<u>2 600</u>	<u>2 600</u>
Prezidanto	20	0,00	40	20
Sekretario	70	0,00	140	70
Redaktoro	150	0,00	300	150
Kasisto/Matrikulisto	20	0,00	40	20
<i>Estrarkostoj</i>	<u>260</u>	<u>0,00</u>	<u>520</u>	<u>260</u>
UEA-kotizoj	65	44,00	65	65
Bankkostoj	150	63,55	65	65
Merituloj	50	0,00	50	50
UK lukostoj	50	0,00	50	50
<i>Generalaj kostoj</i>	<u>315</u>	<u>107,55</u>	<u>230</u>	<u>230</u>
Librovendado (kostoj)	10	0,00	10	10
Varbado (Inf./varba kaso)	10	0,00	10	10
Malprofito de la kongreso		0,00		
Rabatoj de perantoj	5	0,00	5	5
<i>Aliaj elspezoj</i>	<u>25</u>	<u>0,00</u>	<u>25</u>	<u>25</u>
<b>Elspezoj entute</b>	<b>3 200</b>	<b>2 908,55</b>	<b>3 375</b>	<b>3 115</b>
<b>Saldoj</b>	<b>-500</b>	<b>-1 035,35</b>	<b>-750</b>	<b>-490</b>

## **Klarigoj kaj rimarkoj pri la Rezulto 2020 kaj la Buĝetoj 2021/2022**

### **Enspezoj**

#### **Kotizoj**

La jaro 2020, pro la pandemio, kompreneble estis tute alia ol ni ĉiuj planis. La kotizoj en 2020 estis iom pli malaltaj ol planitaj. Bedaŭrinde ankaŭ al la adopta kaso pli malmultaj mondonacoj alvenis ol ni esperis. La adopta kaso estas mondonacoj de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Ili estas petataj kontribui “laŭforte”.

Koregan dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacontoj.

#### **Aliaj enspezoj**

Pli da librovendado okazis en 2020, dank’al Jerald Veit, kiu komencis zorgi pri la Biblio-vendado en Usono. La rentumoj estis pli malaltaj, ol ni planis, tio ne ŝanĝiĝos en la estonteco, do buĝetoj estis modifitaj.

### **Elspezoj**

#### **Revuokostoj**

La kostoj de Dia Regno enhavas kaj la presadon kaj la dissendadon.

#### **Estrarkostoj**

En 2020 ni ne povis persone renkontiĝi, pro tio estraranoj ne povis ricevi la simblan kontribuon por siaj laboroj. En la jaro 2021 ni espereble povos pagi por ambaŭ jaroj.

#### **Ĝeneralaj kostoj**

En tiu ĉi kategorio en la jaro 2020 estis la UEA-kotizoj kaj la bankkostoj. Ankaŭ UK ne okazis en 2020.

#### **Aliaj elspezoj**

Aliaj elspezoj ne okazis en 2020.

### **Saldoj**

La saldo de la jaro 2020 estis bedaŭrinde negativa: - 1 035,35 Eŭroj.

Kaj la enspezoj estis pli malaltaj, kaj la elspezoj estis malpli altaj ol ni planis. Espereble baldaŭ finiĝos la monda pandemio, kaj la sekvantaj jaroj estos ekonomie pli bonaj.

La financa bazo de KELI daŭre estas sufiĉe kontentiga.

### **Buĝetoj**

La buĝetoj de la jaroj 2021 kaj 2022 tamen enhavas negativan rezulton.

Ni daŭre estas optimismaj, kaj ni kredas ke la membraro de KELI daŭre subtenos nian ligon.

# Se ĉiujn lingvojn mi regus

1 Kor 13 • 1 Joh 4,8

1. Se ĉi - ujn lin - gvojn mi re - gus  
2. Am' ne kon - du - tas mal - de - ce,  
3. Lin - gvoj kaj sci - oj per - e - os.

kaj ĉi - an sci - on kom - pre - nus,  
am' ne al - ce - las la me - mon,  
Fid' el - ĉer - pi - ĝos en vi - do.

mon - tojn per fi - do for - mo - vus,  
ĉi - on to - le - ras, el - te - nas,  
Dro - nos es - per' en ple - nu - mo.

se mi for - do - nus min mem:  
ĝo - jas pri jus - to kaj ver'.  
Res - tos nur u - nu, la am'.

Sen la am' \_\_\_\_\_ es - tus mi ne - ni'.  
Kun la am' \_\_\_\_\_ ĉi - on maj - stras mi.  
Ĉar la am' \_\_\_\_\_ es - tas Vi, ho Di'.

Sen la am' \_\_\_\_\_ es - tus mi ne - ni'.  
Kun la am' \_\_\_\_\_ ĉi - on maj - stras mi.  
Ĉar la am' \_\_\_\_\_ es - tas Vi, ho Di'.

1 Kor 13 • 1 Joh 4,8

SE ĈIUJN LINGVOJN MI REGUS • M kaj E (originale verkita):  
Albrecht Kronenberger 2021-06-08